

NIA-DAMO DE PARIZO, RELIVIĜO AŬ ENTOMBIGO ?

Verkita de *Éric Bernard COFFINET* (ebcoffinet.fr) la 13an de decembro 2024

Je la 15a de aprilo 2019 brulego detruis la tegmenton de la katedralo Nia-Damo de Parizo, sen iu ajn klarigo pri kial kaj kiel ĝia multjarcenta trabaro el kverka ligno kvazaŭ ŝtone malmola ekflamis kiel alumeto !

Tute sindonaj al sia misio por nuligi la historion, la kulturon kaj la ligojn de la franca socio, la geedzoj *MACRON* tuj volis okupiĝi pri ĝia rekonstruo kun "sia stampo de moderneco", kiel ili jam faris okaze de la dekoracia renovigo de la palaco Elizeo ! Sed leĝoj tion malpermesis... Ili estis forte ĉagrenitaj ĉar la katedralon oni rekonstruis tute simile al la malnova.

Sed ili tamen sukcesis sin venĝi dum la inaŭguro de la renovigita katedralo je la 7a decembro 2024 per malica misuzo de simboloj, kiel ili jam faris dum la inaŭguro de la Olimpiaj Ludoj. Ŝajnis ke la prezidento *Emmanuel MACRON* malice ĝuis pro tio, kvazaŭ gurdante en si mem la kanzonon de *Britney SPEARS* "Oops, I did it again" (Uups, tion mi ripetis).

Ĉio bone komencis per kortuŝa voko de la plej granda kaj malnova sonorilo, kromnomita *Emmanuel*, kaj poste per la tri solenaj batoj frapitaj de la ĉefepiskopo de Parizo sur la pordego por ke denove la katedralo malfermiĝu al la mondo. Sed tio ne daŭris...

La Romkatolika Eklezio konstruis Francion dum 1500 jaroj. Ĝiaj liturgiaj festoj ritme organizadis la vivon de la socio. La koloroj de la liturgiaj vestoj karakterizis la diversajn tempojn de la jaro : koloro verda de espero por la kutimaj tagoj, viola de pento por Advento kaj Karesmo, ruĝa de sango por Palmo Dimanĉo, Sankta Vendredo kaj Pentekosto, kaj blanka de ĝojo por Kristnasko kaj Pasko. dum flava estis por herezo kaj perfido... Sed ĉion malrespekte miksis la fama modisto *Jean- Charles de CASTELBAJAC*, kiu desegnis la kostumojn de la ĉekepiskopo kaj de liaj pastroj, kvazaŭ alivestante ilin kiel marŝantaj reklamoj por Guglo Kromo aŭ Vindozo dum ia "fashion week" (semajno de modo) !

Poste venis la tempo por "reveki" la grandan orgentubaron de la katedralo, kiun alvokis la ĉefepiskopo por ke ĝi esprimu al Dio amon, fidon, dankegon kaj laŭdegojn de la katolikoj. Sed anstataŭ ĉielaj melodioj, tondre ekbruegis missonado de vera "pandemonio" !

Aludoj franmasonaj kaj alkemiaj abundis en la parolado de la prezidento *MACRON*, dum la nova meblaro "minimumisma" sur la slabaro nigra kaj blanka de la katedralo okulfrape aspektis "franmasona"... kvankam la katolikoj ne rajtas fariĝi franmasonoj ĉar iliaj respektivaj doktrinoj estas tute neakordigeblaj !

Memorende estas kion diris *Emmanuel MACRON* dum intervjuo : "malfacile estas rekonstrui se antaŭe oni ne ĉion detruis". Kiun novan mondon rekonstruotan proponas li post la detruo de la malnova ? Estas mondo konsistonta el interŝanĝeblaj unuopuloj, sen interligoj, sen lando, sen kulturo, sen historio, sen memoro, sen Fido nek Leĝo krom plenlibera rajto de konsumado kaj de ĝuado propraj sen limoj nek bridoj... el unuopuloj fariĝontaj varoj kaj alĝustigaj elementoj por socia mekanismo kaŝe regata de potencoj financaj kaj malhumanaj... ia mondo por estuloj "robotaj" kaj senanimaj.

Mi estas favora al unueco en diverseco, sed nek en unuformeco nek en misformeco !